

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la du pasintaj elsendoj vi aŭdis prelegojn de Charles Ecabert, nia antaŭulo, pri la pedagogia influo de Jean-Jacques Rousseau. Estis du radiodisaŭdigoj, kiuj estis elsenditaj en aŭgusto 1962. En la manuskriptaro de Charles Ecabert ni ne retrovis la tekston, kiu devis konkludi tiun prezenton pri Jean-Jacques Rousseau. Sekvis prelegaro pri la grava svisa edukisto Pestalozzi. Ni legas al vi tiujn interesajn paroladetojn verkitajn de Charles Ecabert.

A.- «La mallonga studo dediĉita al Jean-Jacques Rousseau nin alkondukas, per natura deklivo, al iu el liaj disĉiploj, kiu estis ege frapita per la legado de la eduk-revolucia libro *Emilo* : Johano-Henriko Pestalozzi. Ĉie en la mondo famiĝas la nomo de Pestalozzi, tamen ne estas maloportune iom paroli pri li kaj pri lia verkaro, ĉar liaj ideoj sur la eduka tereno larĝen disvastiĝis kaj lia personeco havas ion kvazaŭ mistika kaj sankta.

Cl.- Aliflanke li ne nur estas unu el la plej grandaj honoriguloj de nia lando, sed tipe reprezentas intiman aspekton de la svisa genio. Lia historiisto eĉ proklamas :

A.- « *Pestalozzi estas por svisoj, kio Goethe estas por la germanoj, Tolstoj por la rusoj, Pascal por la francoj. Kvankam li travivis, plej humila inter la humiluloj, la dramon de sia malriĉa kaj nobla ekzistado, li tamen egalas la plej altajn homojn per la pintoj de sia genio.* »

Cl.- Plue li estas simbolo de nia triobla patrujo, ĉar tra siaj antaŭuloj li devenas de la itala parto de Svislando, li naskiĝis la 12-an de januaro 1746 en la metropolo de la germana parto, Zürich, kaj dum 20 jaroj li ŝvite laboris en la romanda parto, nome en la urbeto Yverdon, ĉe la okcidenta bordo de la neŭŝatela lago, kie bela statuo memorigas lian laboron kaj institucion. Kiel la grekaj civitoj pri Homero, la tri diverslingvaj partoj de nia lando rajtas lin pretendi kiel filon.

A.- Lia patro estis bona okulkuracisto tre mon-malavida. La infano estis nur 6-jaraĝa, kiam la morto batis ĉe la pordo. Antaŭ ol foriri por ĉiam la patro alvokis apud sian liton junan servistinon nomatan Babeli, kun kuraĝa kaj energia animo, petante, ke ŝi neniam forlasu la edzinon. La simpla sed fiera junulino promesis, ke ŝi neniam foriros. Ŝi fidelis ĝis la morto. Ŝia figuro multloke aperos en la posta verkaro de Pestalozzi.

Cl.- Henriko adoleskiĝis sola, ĉar la gefratoj mortis tre junaj, inter la patrino kaj Babeli, en apartigita medio kaj izola atmosfero. Tio impresis profunde liajn koron kaj penson. Dum sia vivo li restos trud-okupita per tiu ideo, ke la vera loko de la unua edukado estas la hejmo, kaj pli precize tio, kion oni nomas en alemana Svislando : **Wohnstube**, loĝada ĉambro, tiu malalta loĝejo, kie fajenca hejtilo komfortecon disdonas. Tie kunstaras skulptitaj mebloj, tie la infanoj faras la taskojn, la patrino trikas, tie oni manĝas, tie oni nokte kunvenas, tie oni kelkfoje laŭtlege libron. Tempe de Pestalozzi ĝi estis kvazaŭ institucio.

A.- Ĉar Pestalozzi reagis kontraŭ la tradicia instruado de sia tempo, oni pensas, ke li ne sekvis regulajn lernokursojn. Tute malprave ; de 1751 ĝis 1765 li trapasis pli ol 14 jaroj sur la benkoj de la lernejo, konatigante kun la maldelikataj samuloj kaj kun la malmildaĵoj de la vivo.

Cl.- « *Mi kredis ĉiun tiel bonvola kaj sincera kiel mi, li diris. Do memsekve kaj ekde la infaneco mi estis persekutita, de kiu ajn volis min primoki. Ne estis laŭ mia naturo kredi ion ajn malbona pri iu ajn, ĝis la momento, kiam mi tute ne plu povis dubi aŭ devis suferi.* »

A.- En 1763 li eniris la kolegion Karolinum, brila akademio, kie li dediĉis la unuan jaron al filologio, la duan al filozofiaj studoj kaj la trian al teologio. Tie li havis kiel profesoron la

faman Bodmer, nerutineman kaj viglan spiriton, en kies instruado, kontraŭ la tiama kutimo, diskuto okupis honoran lokon. La tiama Zurikon oni nomis fanfarone la ĉe-Limat-an Atenon.

Cl.- (Limato estas tieloka rivero.)

A.- Kaj bBodmer oni prave komparis kun Sokrato.

Cl.- Tiutempe en Zuriko la urbestro kaj ties kolegoj de la sekreta konsilantaro aplikis politike kaj ekonomie veran diktatorecon. La burĝoj kaj metiistoj rajtis ekzisti nur dank'al korporacioj, dum la kamparanoj estis traktataj kiel subuloj senrajtaj ; al ili la urbo sendis voktojn, sed malfermis siajn lernejojn. Instruado kaj edukado estis direktumitaj : ili celis modeli civitanojn timantaj Dion kaj magistratojn.

A.- La politika streĉado akriĝis kaj la junaj intelektuloj starigis en 1762 societon **Zur Gerwe**, tio signifas **ĉe la tanejo**, ĉar ili kunvenis en la korporacidomo de la tanistoj. Tiu patriota socio kaŝe havis politikajn celojn. Malantaŭ ŝajna literatura aktiveco politike edukiĝis la junuloj, kribrante ĉiujn civitajn potencojn : Ŝtaton, Eklezion, Monon, kaj pensante ilin en siaj konsciencoj.

Cl.- Ĝuste tiam Rousseau publikigis la verkojn *Socia Kontrakto* kaj *Emilo*. Penso tiel freŝa kaj forta, nova kaj temptaŭga, nerezisteble allogis Pestalozzi, kiu kunportis tiujn librojn eĉ en la preĝejon.

A.- La oficiala kondamno de Rousseau en Ĝenevo pro liaj subversaj ideoj naskis popolan tumulton. La tiea aristokrata registaro apelaciis al diversaj samaspiraj estraroj, inter kiuj la zurika. Zuriko sin pretigis alsendi soldataron, kiam eksplodis skandalo.

Cl.- Kaŝite cirkulis paskvilo en kiu, diskutante kun nobelo kaj vokto, kamparano deklaras, ke la ĝenevanoj rajtas aranĝi sian respublikon laŭplaĉe.

A.- « *Abomeninde estus altrudi al ili reĝimon. Oni sin pendigos, antaŭ ol mi marŝos kontraŭ Ĝenevo. Je Dio, mi ne iros, estas tucerte.* »

Cl.- La verkisto Müller, amiko de Pestalozzi, sukcesis fuĝi ĝis Berlino. Pestalozzi estis enkarcerigita dum 4 tagoj kaj estis punita pagi parton de la ligno por bruligi la aŭdacan paskvilon.

A.- Post tiuj politikaj riskoj kaj aventuroj revekiĝis en la koro de Pestalozzi duondormiĝinta emo al kampa vivado. Sed pri tio ni parolos la venontan semajnon. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-